



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

{ P. BABIN
 { Le Haut des Bourrelières
 { 17, rue Romain-Rolland
 { 85100 Le Château-d'Olonne
 { P.C.K Nantes : 2.813.61 L
 (Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1993 — 2

(APRIL-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la lastaj vojaĝoj de Kolombo...



... Kaj la legendo de reĝo Arturo

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO : *

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

El Grésillon	paĝo 1
Esperanto tra la mondo (Frangeul)	2
Eŭropo konkeras la mondon (F. Boyet)	3-5
Pri reĝo Arturo (S. Boniol)	6-8
Cu etiko de interpretado? (B. Golden)	9-11
La mumio de la reĝo Tubinit (Niemojevski-trad. Kabe)	12-13
Por vis distro (Ph. Combot)	
La vivo en Gresillon.	

El Grésillon

La raportoj de la Ĝenerala kunveno kaj de la komitat-kunveno donas al vi informojn pri la sanstato de Gresillon. Malbona estas la fakto, ke malpli da vizitantoj venis en 1992 ol kutime. Ĉu maltrankviliga punkto? espereble nur iu manifestiĝo de la tiel nomata "eŭropa malgajhumoreco". Ŝajnas, ke ĉijare la aliĝantoj estas pli nombraj. Flanke de tiu konstato ĝojigaj punktoj estas notindaj. Unue pri kulturaj sukcasoj. Ni povas paroli pri sukceso, ne nur pro la nombro da geknaboj (64) kaj kunestantaj plenkreskuloj, kiuj ĉeestis la Printramp Internacian Infanrenkonton, ne nur pro la fakto, ke pli ol deko da ili venis el "trans la limoj", sed ankaŭ pro la diverseco de la aranĝoj, kursoj kaj distraĵoj. La laboro estis granda por la gvidantoj

kaj precipe por la organizantino Paulette Naulet. Bedaŭrinde, pro malfrua manifestiĝo, ankaŭ pro manko de monrimedoj, estis rifuzita la partopreno de orientlandaj grupoj.

Alia punkto estas, ke nova leĝo, finfine bone legita kaj kontentige interpretita, donas al ni la esperon de malpli ampleksa pago de TVA kaj eĉ, ke estos repagitaj sumoj "troaj". Batalado trijara ne estis senutila!

NI FUNEBRAS

Denove granda amiko de nia Esp.domino estas trafita de malfeliĉo. Mortis la 12-an de aprilo Hendrika De Kersgieter, edzino de Fernand Roose. Ili multfoje vizitis Gresillon kaj partoprenis en la kultura vivo tie.

Fernand Roose kaj lia familio akceptu niajn plej amikajn kondolencojn.

Esperanto tra la Mondo



EL ITALIO - S-ino Rosa Russo Jervolino, itala ministro pri publika instruado, subskribis dekreton, kiu kreas komisionon por, interalie, prepari planon por informadi, ĝisdatigi kaj trejni interesitajn instruistojn cele al la promocio de la internacia lingvo Esperanto. Unu el la celoj estus plifaciligi la lernadon de pliaj fremdaj lingvoj.

EL HINDIO - Laŭ decido de aŭgusto 1992, Pioneer Scouts of India enkondukis esperanton, kiel devigan instruon temon por tutlanda skolta programo. Jam eklernis la lingvon 75 instruistoj kaj estraranoj en la tuta lando. Ŝatus ricevi instru-materialon: S-ro A. Halder, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, Hinda Unio.

EL PORTUGALIO - Fine de januaro, oni diskutis en la portugala parlamento, pri petskribo de Portugala Esperanto-Asocio pri enkonduko de esperanto en ses mezgradajn lernejojn. Principe ĉiuj partioj aspektis favoraj, sed la eŭropa parlamento ŝajnis plitaŭga loko por konsideri tiun proponon.

EL POLLANDO - La etnografia muzeo de Toruń, ĉiujare invitas folklorajn orkestrojn kaj grupetojn, kondiĉe, ke estu esperantisto por la lingvaj rilatoj. Nun la muzeo akceptus ankaŭ folkloristojn por prelegoj. Adreso: Etnografia Muzeo, Waly Gen. Sikorskiego 19, PL- 87 100 Toruń Pollando.

EL ĈINIO - Fondiĝis samtempe en Pekino Ĉina Junulara Esperanto-Asocio kaj Ĉina Fervoja Esperanto-Asocio, en kunveno en kiu partoprenis pli ol cent esperantistoj el Pekino kaj aliaj provincoj.

POR LA INSTRUISTOJ - De la 9-a de julio ĝis la 17-a okazos en Kultura Centro Esperantista de La Chaux de Fonds, PF 779, CH-2301 La Chaux de Fonds, Svisio, intensiva metodologia kurso por instruistoj, en kunlaboro kun ILEI, kun, interalie, S-ro Duncan Charters, profesoro en Principia College, Illinois, Usono. S-ro Charters partoprenas en nova sistemo por instruado de la lingvoj funkciante pere de komputoro.

POR LA INFANOJ - Se vi rilatas kun infanoj, kiuj lernas esperanton, ĉu vi konas la "Kastoran Klubon" kaj la gazeteton "Kara Amiko!?" Ili tiel povas ricevi facilan legaĵon kaj trovi amikojn en la tuta mondo. Adreso: "Kastora Klubo" ul. Puławska 3-11, 02-515 Warszawa Pollando. Franca perantino: Paulette Naulet, an bourg, 49490 Breil.

ESPERANTO KAJ KOMERCO - Internacia Kunlabora Kunsido de Internacia Komerca Esperanto Fak-grupo kaj Shaahxi-provinca Industrio-Komerca Federacio okazos en Xi'an, Ĉinio, de la 20-a ĝis la 25-a de aŭgusto. Oni celas aranĝi komercajn partneradojn pere de esperanto en la komerca aktivado kaj fondi la komerc-ekonomian reton de IKEF tra Ĉinio. Kontakti: Roland Rotsaert, Visspanstraat 97, B- 8000 Brugge, Belgio.

En Instituto, kiu preparas "manaĝerojn" en Slavjansk, Ukrainio, funkcias esperanto-fako. La gvidantaro de la Instituto pretas kontakti similajn organizojn, kiuj uzus esperanton por kunlaboro, interŝanĝo de studentoj. Skribi al: Aleksandr Sergeevič, esperanto-fako, a/ja 1C UKR-343263 Slavjansk, Ukrainio.

Komercaj anoncoj aperas nun en "Monda Merkato", Pf. 1539, W-8120 Weilheim, Germanio.

DIVERSAJ RENKONTOJ - En Habères-Poche, Alpoj, 21-an ĝis 28-a de aŭgusto, kaj en Sète, mediteranea marbordo, 4-an ĝis 11-a de septembro: kursoj, ekskursoj, vesperoj, banado. Inf. Kultura esperanto-Centro, 5, rue du Dr Roux, F-34000 Montpellier.

En la kastelo de Taillé, apud Tours, la 2-an kaj 3-an de oktobro, kursoj diversnivelaĵ. Inf. Centre Culturel esperanto, 6, av. du Général de Gaulle, F- 37000 Tours.

Trinivelaj kursoj en Mittelwihr, 16-an kaj 17-an de oktobro. Inf: Ed. Ludwig, 26 route de la Schlucht, F- 68140 Stosswihr.

EŬROPO KONKERAS

LA MONDON (2)

LA UNUA RENKONTO EN "SAN SALVADOR"-

La Hispanoj elŝipiĝis ceremonie; Kolombo, kiu estis "Admiralo de la Oceana Maro" portis la reĝan flagon; li estis akompanata de la proprietuloj de la karaveloj, la fratoj Pinzon, kaj estis tie interpretisto, kiu konis la lingvojn araban, aramean kaj hebreean. Krome Kolombo havis leterojn de la reĝo por la Granda Hano, la estro de Ĉinio. Fine la interpretisto "gestas", sed tamen Kolombo solene deklaras, ke li ekposedas, nome de la reĝoj de Hispanio, la teron, kiun li tuj nomas "San Salvador". Estis fakte iu koloniado tute malsimila de la komercado de la Portugaloj en Afriko. Kolombo skribis al la reĝoj, ke la lando estas mirinda, la bestoj kaj plantoj estas neniam vidataj, la homoj estas afablaj, tre belaj. Sed ne estas oro kaj Kolombo decidis viziti aliajn regionojn. La 14-an de oktobro, Kolombo kunprenas 7 homojn de la insulo por instrui al ili la hispanan lingvon. Li skribas al la reĝo: "Sufiĉas tie instaligi, ordoni al la enloĝantoj, kiuj faros ĉion, kion oni petos de ili. Oni vidas, ke ili estas farataj por esti ordonataj; oni laborigu ilin por semi, konstrui urbojn kaj sin vesti same kiel ni." Tiuj frazoj tute precize difinas koloniismon kaj tio okazis je la unua renkonto. Oni antaŭ nelonge serĉis spurojn de la paso de Kolombo, kaj oni nun certas pri la insulo, kiun li trafis en la Bahama insularo: ĝi estas nomata "Guanahani" kaj estis enloĝata ekde la jaro 600.

La 28-an de oktobro Kolombo albordis la insulon Kubo. Tiam li trovis veran teritorion kun vere abundaj novaĵoj: tabako, tomatoj, kakao, ananasoj, fazeoloj, vanilo, terpomoj, arakidoj, meleagroj, ktp. La 6-an de decembro 1492 li atingis la insulon, kiun oni nomas nun "Dominik-insulo". Li estas kontentega

pri la montoj (oni sciu, ke en la loka lingvo la vorto "ayti=aiti" = montara lando) kaj inter la montoj estas riĉaj valoj, inter kiuj unu estas tutsimple nomata "valo de la Paradizo". Pro la riĉeco de tiu teritorio, Kolombo deziras tie restadi, kaj li nomas tiun insulon "Hispanjola". Fakte la vera nomo de la insulo estis "Guakana-gari" kaj la nomo de la popolo, kiu tie loĝis estis "Tainos". La "Tainos" apartenas al la popolaro nomata "Arawaks". La nombro de la Tainos estis proksimume tri milionoj en 1494; ili estos nur 70 000 en 1508!

La 24-an de decembro la karavelo "Santa Maria" (antaŭe nomata La Gallega) rompiĝis kontraŭ sabla amaso. Kolombo tiam decidis reveni al Hispanio per la karavelo "La Nina" ĉar Martin Alonzo Pinzon estis kun La Pinta en alia loko por serĉi oron. Reveni per unu ŝipo, kiam oni alvenis per du necesigas la restadon de homoj surloke. Fakte kiam Kolombo revenis al Eŭropo, 39 homoj restis sur la insulo, kie oni konstruis fortikaĵon. La koloniado komenciĝis dum Kolombo revenis Hispanion en marto 1493 post paso tra Portugalio. Oni organizis festojn en Barcelono kun papagoj kaj indianoj; vera triumfo por Kolombo.

LA DUA VOJAĜO (17 ŝipoj-1200 homoj)

Inter septembro kaj novembro 1493 Kolombo navigis inter la insuloj, kiujn oni nun nomas "Malgrandaj Antiloj". Speciale li nomis "Dominica" la insulon, kiu konservis tiun nomon. Oni ne konfuzu kun Dominik-insulo, kiu estis Hispanjola kaj nun entenas la respublikojn Haitio kaj San-Domingo. Tie li renkontis, de malproksime, aliajn homojn, la Karibojn. Dum Kolombo estis priskribinta la unuajn indianojn, kiel bonajn sovaĝulojn, la kariboj estas prezentataj kiel monstroj, ĉar ili manĝas homkarnon. La historiistoj nun klarigas, ke la kariboj estis popolo, kiu laste alvenis en tiun regionon kaj konservis la antaŭajn kutimojn. Kolombo mem ne rilatis kun la kariboj; estis interŝanĝo de sagoj de malproksime,

sed Kolombo, kiu tiam disponis pri interpretisto, ricevis la plendojn de la viktimoj de la kariboj.

Cetere oni konas bonan priskribon de tiuj kariboj dank'al homo, kiu vivis kun ili de 1619 ĝis 1620. En tiu socio la viroj kaj la virinoj uzas malsimilajn lingvojn. Oni manĝas nur la viandon de viroj por tiel akiri la forbon de la malamiko. La homa viando estas manĝata, kiam la kaptinto mortigis klabe la kaptiton, kies karnon oni distranĉos kaj fumaĵos por konservado. En 1503 la hispanaj reĝoj akceptos la sklavigon de la kariboj, sed ne de la arawaks... sed surloke oni tute ne atentis pri tio; oni precipe mortigis la indianojn ĉar ili ne akceptis la katolikajn religion. Jen ekzemplo: iuj indianoj kovris la kristanan krucon per tero kaj poste urinis sur la teron asertante, ke tiel la rikoltoj estos pli bonaj. Sed por la kristanoj tio estis sakrilegio kaj oni tuj mortigis la indianojn.

Okaze de tiu dua vojaĝo, la 12-an de junio 1494, kiam la ŝipoj navigis proksime al Kubo, Kolombo postulis de la maristo, helpe de notario, kiu akompanis la vojaĝantojn, ke ĉiu asertu, ke "li tute ne dubas, ke la rekontita tero estas la firma tero de la komenciĝanta Indio". Se iu diros la malon, "oni punos lin per monpuno de 10 000 maravedoj kaj tranĉos lian langon". Kompreneble ĉiuj sciis, ke ĝis nun ili renkontis nur insulojn, sed Kolombo sciis, ke la Portugaloj komencis interesiĝi pri la okcidenta vojo, kaj decidis, eĉ mensoge, proklami sian antaŭecon. En oktobro 1495 alvenas al Hispanjola iu enketisto, Juan Aguado, sendita de la reĝo, ĉar oni komencas serioze kritiki la administradon de la kolonio fare de Kolombo. En 1496 Kolombo revenas al Hispanio.

LA TRIA VOJAĜO— Post restado en Hispanio, kie li komencas verki la "libron de la mirindaĵoj", Kolombo, en 1498, denove foriras okcidenten. Tiam li vojaĝas tute proksime al la vera kontinento. La 1-an de aŭgusto, li nomas insulon "Trinidad", ĉar estas tri montoj kaj li pensas pri la sankta "Triunuo". Li vidas de malproksime la kontinenton, kiun

li nomas "Tero de la Graco". Li rimarkas la grandan kvanton de nesalita akvo, kiu venas de la kontinento; temas pri la riverego Oregon. Li tiam skribas: "Kaj mi diras, ke se tiu akvo ne venas de la surtera Paradizo, ĝi venas de tero senfina, do situanta ĉe la sudo kaj pri kiu ĝis nun oni sciis nenion". Jen la vera malkovro de Ameriko. Fakte inter la kunvojaĝantoj de Kolombo estis Amerigo Vespucci kaj poste oni skribos, ke li, la unua, malkovris novan mondon.

Kolombo havis tiam strangan ideon, imagante, ke la surtera Paradizo estas sur tiu nova kontinento, kaj li komparas la formon de nia tero al piro, kies pinto, apud la tigo, estas la plej alta kaj tie kuŝas la surtera Paradizo. Sed tiuj pripensoj de Kolombo ne interesas la Hispanojn, kiuj konstatas la malbonan funkciadon de la kolonio en Hispanjola. Kaj kiam Kolombo revenas de Trinidado al Hispanjola, li devas batali kontraŭ ribelantoj. La 23-an de aŭgusto 1500 alvenas nova guberniestro Bobadilla kaj Kolombo estas arestita kun sia familio. Ĝus malkovrinte la novan mondon li alvenas en Hispanion kiel kaptito.

LA KVARA VOJAĜO (1502 - 1504)

Kolombo sukcesis reakiri la eblecon denove vojaĝi al la "Indoj", sed tiu lasta vojaĝo alportis nenian malkovron. Tiam li navigis sur la bordo mem de la meza Ameriko, kaj li donis la nomon "Costa Rica" (=Riĉa Marbordo), kiu ankoraŭ restas, sed li suferis pri tempestoj, kaj restis sen ŝipo en Jamaiko. Iu amiko sukcesis iri, per boato, ĝis Hispanjola kaj tie aĉetis, per la mono de Kolombo, iun ŝipon. Sed okazis ribelo en Jamaiko kaj nur per ruzo kaj helpe de luna eklipso, Kolombo sukcesis reveni al Hispanio, kie li mortis unu jaron post la reĝino Izabela, tio estas en 1506.

KONSEKVENCO DE LA UNUA PARTO DE

LA HISPANA KONKERO — Post la kvar vojaĝoj de Kolombo, la hispanaj Reĝoj ja havis kolonion en parto de la mondo ne precize konata. Unue, oni parolis pri "Indoj" kaj la nomo estis konservita eĉ kiam oni sciis,

ke la kontinento estas tute nova. Tamen de tiam oni serĉis terojn okcidenten kaj okazis rivaleco inter Hispanio kaj Portugalio. Unue en 1481, tio estas antaŭ la vojaĝoj de Kolombo, la papo akceptis, ke Portugalio etendu sian suverenecon trans la Kanariaj Insuloj. Sed tiu difino estis malpreciza. Poste la limo estis precizigita per linio norde-suden, kiu situas je 100 leŭgoj okcidente de Acoroj. Kaj fine, en 1494, Portugaloj kaj Hispanoj renkontiĝis en Tordesillas, apud Valladolid, kaj tie la papo Aleksandro la 4-a arbitraciis, kaj la nova limo estis je 370 leŭgoj okcidente de la insuloj de la Verda kabo. En 1507 oni presis en Francio iun libron jam presitan en Florenco, en kiu oni rakontis la vojaĝojn de Amerigo Vespucci. Tiu franca libro estis mendita de iu kanoniko de germana deveno nomata Wladseemuller, kaj al la franca eldono oni aldonis enkondukon, kie estis tiu frazo: "La kvara parto de la mondo, kiu de kiam Amerigo Vespucci malkovris ĝin meritas la nomon "Amérique"...". Dum tri jarcentoj, ĝis la momento kiam oni eldonis la verkojn de "Las Casas" la homaro kredis tiun rakonton. Sed tio estas mensogo, unue ĉar la rakontanto parolas pri unua vojaĝo en 1497 (la vera estis en 1498 kun Kolombo), kaj li imagis aliajn vojaĝojn, por ke ili estu kvar same kiel tiuj de Kolombo. Fakte Vespucci, post la vojaĝo kun Kolombo vojaĝis dufoje sed por la reĝo de Portugalio.

UNUAJ PAŜOJ DE KOLONIADO -

Hispanaj malkovroj kaj konkeroj.

1507: du Hispanoj elŝipiĝis en Jukatano.
1513: Balboa serĉas "El Dorado"-n kaj fakte transpasas la istmon kaj atingas la Pacifikan Oceanon; sed li estas senkapigita de sia anstataŭanto.
1518: malkovro de Meksikio, kiu estos konkerita de Cortés, 1519-1521.
1524-1526: Pizarro kaj Almagro malkovras Peruan, kies konkero daŭros de 1531 ĝis 1535.

Portugalaj malkovroj kaj konkeroj.

Laŭ tradicio, en 1500 iu Portugalano, Pedro Alvarez Cabral malkovris Brazilon, kiun li nomis "Terra de Santa Cruz" kaj en tiu komenciĝanta 16-a jarcento

la vojaĝoj kaj malkovroj multiĝis, sed tiam la Portugaloj ne interesiĝis pri tiu lando. Tamen en januaro 1502 Gonçalves Coelho malkovras lokon kun rivero, kiun li nomas "rivero de Januaro" t.e. "Rio de Janeiro". Samtempe pro la ligno de iu nekonata arbo, kiu servas por tinkturi, kaj kiu estas nomata "brazil", oni nomas la landon per tiu nova nomo. En 1531 Francioj instaligis en la regiono de Pernambuko (hodiaŭ nomata Recife). Sed pro la traktado de Tordesillas, la reĝo de Portugalio estas suvereno; li provas forpeli la ne-Portugalajn sed mankas la koloniantoj. Tial oni sendas tien la kondamnitajn, la prostituitojn, poste la judojn.. sed tamen en 1570 estas nur 15 000 koloniantoj. La Portugaloj preferis zorgi pri la diversaj punktoj de Afriko kaj Azio, kie ili provis komerci. Kaj kelkfoje okazis bataloj kontraŭ la enloĝantoj, kaj ankaŭ kontraŭ la antaŭe instalitaj komercistoj.

Anglaj vojaĝoj - La reĝo Henriko la 7-a helpis la Ĝenovanon Kabo ("Cabot"), kiu ekde 1497 malkovris norde de Ameriko Labradoron kaj Novteron.

Francaj vojaĝoj - Menciinda estas la vojaĝo de Jak Kartier ("Jacques Cartier"), kiu iris en 1534 al Novtero kaj en 1535 al Kebekio.

BILANCO DE TIU KOLONIADO - Bartolomeo de Las Casas, kiu renkontis Kolombon, kiam li estis infano, fariĝis kolonianto sed poste pastro kaj fine eniris la ordenon de Sankta Dominiko por lukti kontraŭ la malbona konduto de la konkerintoj, skribis, ke en Hispanjola vivis en 1494 tri milionoj da enloĝantoj. En 1540 restis nur 250. Por la tuta Ameriko dum la jarcento kiu sekvas la vojaĝon de Kolombo oni opinias, ke pli ol 60 milionoj da "indianoj" mortis. La invadantoj kunportis mikrobojn, kiel tiuj de morbilo, variolo, skarlatino... ĝis tiam ne agintaj en Ameriko. Sed ankaŭ agis la koloniado per peniga laboro, teruraj punoj, religiaj masakroj, memmortigoj de "indianoj", kiuj simple atendis la morton, aŭ rifuzis naskigi infanojn en tiaj kondiĉoj.

F. ROYET

PRI REĜO ARTURO KAJ ALIAJ

La artura tradicio konsistas el romanformaj rakontoj pri aventuroj kaj magiaĵoj. Ĝin naskis la plektosekvo de la keltaj mitoj kaj legendoj. La malsimpla etikregularo de la "korteza amo" aldonas al la tuto novan dimension. Surfone de tiu potenca strukturo ni malkovras la senfinan reciprokan agadon de la mondoj nia kaj transa. Senmorteco, harmoniigo kun la Tero, amo vera, spirita plenumiĝo: jen tio, al kio la herooj iras renkonte dum sia vagado. Kaj tiuj mitaj renkontoj - riĉaĵo de iu okcidenta tradicio - mantriĝas ekstertempaj, eĉ kapablus ludi rolon en nia ĉiutaga vivo.

Arturo estas kelta heroo. Eĉ kiam li fariĝas kristana reĝo, li daŭre estas tipa emblemo de la kelta socio. La deveno de Arturo miksiĝas kun nebuloplena mitaro. Laŭlegende li naskiĝis dank'al la arto de magiisto, kiu poste fariĝas lia konsilanto. Laŭ la historiaj donitaĵoj reĝo Arturo naskiĝis eble en Kimrujo aŭ Kornvalo kaj vivis inter la kvina kaj la sesa jarcentoj. Ne elstara reĝo estis li, sed militisto, tamen kapabla superregi la armeojn de reĝetoj kaj batalemaĵoj klanestroj, kiuj, post foriĝo de la romana aŭtoritato, fariĝintus la viktimoj de la novaj invadantoj el Frisolando, se Aruro ne trudus al ili koherajn interligojn. Povas esti, ke li trejnadis trupon de ĉevalrajdantoj (el tio fontus la Kavaliroj de la Ronda Tablo), scipovantaj fulme galopi de loko al loko laŭ famkonata romana taktiko transdonata de Arturo mem. Tial ĉi-lastata akiris al si kvazaŭ prestiĝan nimbon.

Post la invado de la Saksoj, la Britoj rifuĝis en Bretonujon; tiel plivastiĝis la kelta tradicio, ĝis la trobadoroj de kastelo al kastelo migrantaj ĝin diskonigis per kantoj kaj rakontoj, kiujn la mezepokaj romanoj siavice transprenos. Dum la XII-a jarcento la "Historio pri la reĝo de Britio" de Geoffroy el Monmouth estis la

unua verko rilata al la kelta tradicio, kvankam la aŭtoro ankaŭ prialudas duon-historiajn rolulojn, kiel reĝon Lear kaj magiiston Merlin. Sed la verko kunigas kaj unuecigas la disajn elementojn. La latinlingva originalo estas tradukita en la saksan kaj normandan kaj aldonigas la "Ronda Tablo". Elinter deko da versioj aparte menciindas, fine de la XII-a jarcento, la teksto de la franca poeto Chrétien de Troyes. Lia verko entenas la tuton de la artura tradicio. Eĉ pli: li estas la unua raportanto pri la amaventuroj de Lanceloto kaj Guenièvre kaj pri la Grala Serĉado. Antaŭe la du temoj estis buŝe pritrakataj, sed ne skribe. Kaj dum tri jarcentoj la artura literaturo disflorados en ambaŭ Britio kaj Bretonujo.

Spite kelkajn malgravajn neperfektaĵojn Arturo konsistigas ekzemplodonan modelon por kristana reĝo. Je pli profunda niveloj, ol tiu de la keltaj rakontoj, la arketipoj, fandiĝintaj en la krisolo de la tempo kaj cirkonstancoj, kombiniĝas laŭ ciklo, kiu transdaŭros la jarcentojn. Samkiel ĉiuj mitaj herooj, senmorta estas Arturo. En Avalon (la kelta paradizo) li ĝisatendas la tagon, kiam malprospero de lia lando revokos lin sur nian teron. En li kuŝas ĉiuj karakterizaĵoj de mita arketipo: stranga naskiĝo, mistera morto, magiaj armiloj; li kunigas dekduon da herooj, kiuj sidas ĉe ronda tablo, la rondecon de la tero kaj ĉielo simbolanta; kiam li foriĝas, malpli valora iĝas la mondo, sed lia revo pri perfekta surtera regno pluivas. En ĉiuj tiamaj ĉefromanoj, la kerno, la centra astro, t.e. Arturo.

En la artura ciklo jen aperas la tuta amosenta gamo: de la plej granda voluptemo ĝis profunda mistikismo. Kaj variadas la esprimmaniero de generacio al generacio.

Ĉe la Keltoj amorado estas ludo, plezuro, kiun tute nature viroj kaj inoj ĝuadas. Sed ĝi ankaŭ konsistigas rimedon por mistike ekrilatiĝi kun la natur-elementoj. Tial sanktan karakteron alprenas reĝeco, geedziĝo inter la reĝo kaj la Tero; tial la multenombraj amrilatoj kun la fonto-virgulinaj, kiuj poste naskos heroojn, kies prapatraro

tre ofte apartenas pli ol duone al la transa mondo. En la artura ciklo multaj ĉefroluloj havas similan devenon, interalie Arturo, Lanceloto kaj Tristan. Oni klare konscias pri la kelta origino de tiuj tradicioj se oni konsideros la amvivon de tiuj lastaj du, eĉ se en la epoko, kiam ili beletre apogeis, la maniero pritrakti la antemaron estis alprenanta tre malsamajn formojn. Por mezepokano la amosento povas respeguli ĉiujn trajtojn de religia konduto, de kulto; aŭ inverse esti en rilato kun la peko, do evitanda. Eĉ foje ĝi antaŭprezantas la romantikan sintenon de la XIX-jarcentuloj.

Nepreciza montriĝas la origino de Lanceloto. Pro tio, ke fajran glavon li uzas, li estas konsiderata, kiel suna heroo. La unuan fojon estas parolate pri Lanceloto dum la XII-a jarcento fare de svisa poeto, kiu tamen ne mencias la plej faman amepizodon: la amon de la kavaliro al reĝino Guenièvre. Koncerne Tristanon, pli multenombraj estas la historiaj fontoj. Eble temas pri iu Drust, aŭ Drustan, ano de la praa popolo en Britio loĝanta antaŭ la alveno de la Keltoj. En la kelta literaturo troveblas fragmentaj informoj pri lia vivo, ĉefe pri lia korligiteco kun la edzino de reĝo March (Marko). Tristan estas la ĉefgardisto de la porkaro de Marko; en la kelta tradicio sankta estas tiu besto, ĉar dediĉita al patrino diaĵo. Unuavide tute samas Lanceloto kaj Tristan: ambaŭ edukitaj for de ties familio kaj lando; ambaŭ senegalaj batalantoj; ambaŭ modelaj amantoj. Ĉe la XII-jarcentaj rakontistoj, laŭ kies opinio eksteredzeca amo estas virto, la sindonemo al la damo alprenas kvazaŭ religian dimension. Sed tre malsamajn amformojn Lanceloto kaj Tristan ilustras.

Lanceloto estas la filo de reĝo Ban, unu el la plej fidelaj partianoj de Arturo, kies reĝado ĵus komenciĝis. Ban, venkita de siaj najbaroj vidas la fajregon, kiu detruas lian kastelon kaj svenas... por ĉiam. La edzino, por ekhelpi lin, momenton flankenlasas la suĉ-

infanon Galaad. Lin tuj akceptas kaj prizorgas la Damo de la Lago. Li estas edukita sine de fea mondo sub la nomo Lanceloto. Je la aĝo 18 jarojn li iras for, retrovas siajn kuzojn kaj duonfraton kaj la kvaropo sin direktas al la kortego, de Arturo. Omaĝe al la sindonemo de Ban, Arturo favoregas la junulon. Laŭ kelkaj tekstoj, Lanceloto estas komisiita konduki la reĝinon Guenièvre al Arturo; laŭ aliaj ili estas jam geedzoj. Lanceloto estas iniciata en la ordenon de la kavaliroj de la reĝino kaj plenumas serion da gloraĵoj. Iun tagon li malkovras siajn verajn devenon kaj nomon samtempe, kiel profetaĵon: la propra filo ankaŭ nomiĝos Galaad. Reveninte al la reĝa kortego li fariĝas Kavaliro de la Ronda Tablo kaj estas komisiita gardi la reĝinon. Sed nenuligebla estos la amo, kiun ili reciprokos. La tutan vivon Lanceloto batalados kontraŭ la propra konscienco. Por eviti la kortegon kaj reĝinon li senĉese impetos al novaj serĉadoj. Post trompaĵo fare de la filino de la gral-gardisto, kiu senhonte arogas al si la nomon Guenièvre, li koncipas la filon Galaad, la sukcesonton en la serĉado de la gralo. Ĉar se Lanceloto atingos la pordon de la kapelo, kie staras la ujo, anĝela ĉeesto malhelpos, ke li eniru pro tio, ke pli grandan amon li donis al Guenièvre, ol al Dio mem. Post la serĉado, forpaso de multaj kavaliroj kaj deĵorŝanĝoj, Mardred, bastardo de Arturo, tekas la fiplanon detrui la kavalirojn de la Ronda Tablo. Li spionas la geamantojn kaj ilin subaŭdas en la momento, kiam ili rezignas pri la reciproka korligiteco por la bono de la reĝlando. La fiulo devigas Arturon ŝtiparumi la edzinon. Lanceloto ŝin liberigas, sed dum senkompata milito Arturo lin postsekvas en Bretonujon. Mordred profitas la regentecon por anonci la morton de la patro kaj esti kronata. Sed Arturo revenas Britujon, lastfoje batalas kontraŭ Mordred. Ve! Mortigan baton li ricevas. Tro malfrue alvenas Lanceloto. Kiam li reatingas la reĝinon, ŝi ĵus monaĥiniĝis; siavice li fariĝas ermito. La tutan vivon

la kompatinda estas senĉese mistaŭzita de la konflikto inter amo kaj devo. Tamen lia amo estas iamaniere pura. Antaŭ ĉio li estas dignoplena homo, kiun ege suferigas la okaza neceso trompi la reĝon, al kiu li faras kiel eble plej bonan servadon.

Pli senmoralas aspektas Tristan. Malskrupulema li montriĝas, kiam li elpensas trafikajn fitrompaĵojn: ekzemple kiam li sin vestas, kiel almuzulo por trapasigi rivereton al Izolda. Tiel ĉi-lastas povas senpeke ĵuri, ke neniu viro ŝin jam tuŝis, krom la reĝo kaj... la almozetanto. Ĉu la fama amtrinkaĵo konsistigis tutdecidan elementon? Dubindas. Ĉetere Marko, male de Arturo, ne estas verdire tre nobla reĝo: li ne hontas liveri la edzinon al bando da lepruloj por puni ŝin kaj plurfoje provas mortigi Tristanon. Ŝi ne forgesu, por ne maljuste taksi lin, ke tiuepoke pli gravis la fideleco de amanto al la damo, ol de edzo al la edzino. Tio evidentis por homoj, kiuj konsideris geedzecon kiel politikaĵon prefere al amafero. Laŭ la trobadoroj, fakuloj pri la kavalira amo, amosento neblas inter geedzoj. Kaj tiom ampleksiĝis la amkonduco tiaspeca, ke la eklezio estis devigata kontraŭstari. Tiun fakton evidentigas, en la artura ciklo, la nova pasio simbolata de la serĉado pri la gralo.

La XII-a jarcento estas la plej brila epoko de la disvolviĝado de la "rafinita amo". La tiaman konduton difinas la kapelpastro de Marie de Champagne, filino de Alienor el Akvitanio. Senĉese la trobadoroj prikantas la dian elementon en virino kuŝantan, kiu donas inspiron al viroj kaj ilin levas tre altan, super la kutima homkondiĉo. Tiel la esenco de la kavalireco fontas el la amo, dum tiu, kiu volas tutplenumi sian kavaliran promeson, estas siavice modlata de la postuloj de la servo-farado. Unica fariĝas la amo. Jen la klarigo, kial tiom da virinoj, en la artura ciklo, devenas el la transa mondo. Multaj herooj, adorinte iun tian virinon ricevas siavice kundividon de la supernatura heredaĵo.

S. RONTOL (Daŭrigota)


JAPANAJ MAKAKOJ

Vice paŝantaj sur la flanko de neĝkovrita monteto de la insulo Honshu, la makakoj zorge metas siajn piedojn en la spurojn de la antaŭanto. La grupo supreniras al la alta valo, kie ŝvebas alloga vaporo eligata de varmaj fontoj. Alveninte ili kontentece englitas en la akvon. La varmo suprenvenanta tra la terkrusto varmigas iliajn duonfrostitajn korpojn kaj iom post iom ili malstreĉiĝas.

La japana makako estas la plej nordula el ĉiuj simioj; ĝi kapablas toleri la agrablan varmon de la sudaj insuloj kaj la malvarmegon de la nordaj montoj. Ne estas facile spiti la vintrajn neĝojn, eĉ kiam defendas vin dika felo. Sed uzante la varmon de la termofontoj, la japanaj makakoj travintradas, manĝante arboŝelojn.

Aliaj grupoj vivantaj pli norde, preferas travintri sur la ebenaĵoj. Ili instinkte naĝas, kiel la hundoj, uzante siajn antaŭajn piedojn. Tranaĝante la markolojn, kiuj apartigas la insulojn, ili koloniis grandan parton de la lando. Eĉ la junaj makakoj tre frue kapablas plonĝi kaj padeli en la akvo.

En kelkaj regionoj de Japanio, grupoj de makakoj vivas en, aŭ proksime al temploj. Dank'al la nutraĵo donita de la monaĥoj kaj de la vizitantoj ili kelkloke ampleksas milojn da individuoj.



ĈU ETIKO DE INTERPRETADO

La plej malnova profesio-la prostituado

Estas ofte dirite, ke la plej malnova profesio estas la prostituado. Pro sia disvastiĝo tra senlimaj, tempaj kaj spacaj dimensioj, ĝi jam delonge enradikiĝis en la homa kulturo, do estas neeble nei ĝian antikecon kaj universalecon. Nu, en la vasta historia perspektivo de la homa evoluo, ĉu estas trovebla la profesio, kiu meritas la honoron esti la dua plej malnova profesio? Mi elektas la interpretadon, kiu, efektive, havas komunajn trajtojn kun la prostituado. Laŭ la vidpunkto de tiuj homoj, kiuj rigardas ambaŭ agadojn negative kaj malestimige, ili ne nepre estas bezonataj, kaj la homaro estus en pli bona morala kaj mensa stato, se ili ne ekzistus. Tamen, kun rilato al la unua profesio, fiaskis multaj longdaŭraj perfortaj kaj laŭlegaj provoj forigi ĝin, ĉar ĝi konstante reaperas en aliaj formoj. Eĉ ĉiam pli liberaliĝantaj seksaj moroj en kelkaj partoj de la mondo ne sukcesis definitive malaperigi la prostituadon. La interpretado kondukas en simila maniero. Malgraŭ pliintensigo de fremdlingva instruado kaj ofte faritaj provoj enkonduki unu solan lingvon por komunikado inter homoj handikapitaj pro la malbeno de Babelo, interpretistoj, fakte, estas absolute ne malhaveblaj por ebligi plenumadon de gravaj taskoj en multenombraj internaciaj organizaĵoj. Kiam okazas renkontiĝoj de ŝtatestroj por pritrakti diversajn temojn, fotografaĵoj en gazetoj montras, kiel ĉiam ŝovas sin inter la altajn funkciulojn ankoraŭ unu ulo, la ĉiamĉeestanta interpretisto.

La problemoj de la ekzisto de prostituado kaj interpretado havas du flankojn. Oni povas demandi ne nur, ĉu la du profesioj vere estas necesaj por homoj vivantaj en la hodiaŭa mondo; eĉ pli arda diskut-temo estas jena: ĉu la prostituado kaj la interpretado havaj ankaŭ

bonajn ecojn? Alivorte, ĉu ili povas esti eĉ utilaj en certaj cirkonstancoj? Tiuj kiuj defendas la prostituadon argumentas, ke ĝi estas "bezonata malbono", ĉar ĝi funkcias kiel savoklapo por viroj, alimaniere ne scipovantaj kontentigi sian seksan impulson. Estas alportitaj statistikaj donitaĵoj montrantaj, ke en urboj kaj landoj, kie la prostituado estas persekucata kaj subpremata, pli ofte okazas seksaj krimoj kontraŭ virinoj. Estas ankaŭ ekonomia kialo por pravigi la ekziston de tiu profesio, ĉar ĝi donas eblon perlabori monon fare de multaj malriĉaj virinoj, kiuj ne povas trovi alian specon de laboro.

Kion oni nun diru pri la interpretado? Ĉu ankaŭ ĝi estas "necesa malbono", kiun la homaro devas toleri ĉar, manke de internacia lingvo uzata de ĉiuj, interpretistoj devas interveni por ebligi komunikadon trans lingvolimojn? Rezonante eĉ pli forte, ĉu oni povas demonstri, ke interpretistoj ja faras utilajn servojn, ne nur sur la lingva nivelo sed ankaŭ en la sfero de diplomatio? Tiu ĉi tezo trovas pravigon en la sekva literatura ekstrakto.

Drameca interparolado en la antikva Egiptujo—La pola verkisto Boleslaw Prus, en sia romano "La Faraono", priskribas aŭdiencon, kiun aranĝis la princo Ramzes. Tiu ĉi sidis sur seĝo sub baldakeno en sia salono, kiam alvenis du asirianoj, la glora Sargon, la ambasadoro kaj rajtigito de la granda reĝo Assar, kaj lia kunulo la pia profeto Istubar. Ĉeestis ankaŭ Mentezufis, la oficiala interpretisto, kiu scipovis la egiptan kaj asirian lingvojn. Nek Ramzes nek Mentezufis sciis, ke la asiriano Istubar estis en tre privilegiita pozicio, ĉar li komprenis la lingvon de la egiptoj.

"Sargon proksimiĝis al la estrado kaj diris asirie, kion tuj ripetis tradukisto egipte: Mi, Sargon, generalo, satrapo, kaj boparenco de la plej potenca reĝo Assar, venas saluti vin, vic-reĝo de la plej potenca faraono, kaj kiel signon de eterna amikeco oferti

al vi donacojn...

La princo apogis la manojn sur la genuoj kaj sidis senmove, kiel la statuoj de liaj reĝaj antaŭuloj. -Tradukisto, diris Sargon, ĉu vi malbone ripetis al la princo mian ĝentilan saluton? - Mentezufis, staranta apud la estrado klinis sin al la princo. -Sinjoro, murmuretis li, la nobla Sargon atendas favoran respondon. -Do, respondu al li, eksplodis la princo, per kiu rajto li parolas al mi, kvazaŭ al egalulo? - Mentezufis konfuziĝis, kio ankoraŭ pli kolerigis la princon. kies lipoj komencis tremi kaj okuloj brili. Sed la Ĥaldeano Istubar, kiu komprenis la egiptan lingvon, diris rapide al Sargon: Ni falu sur la vizaĝon!... -Kial mi devas fali sur la vizaĝon? -demandis Sargon kun indigno. -Falu, se vi ne volas perdi la favoron de nia reĝo, eble eĉ la kapon... Dirinte tion Istubar kuŝiĝis per sia tuta longo, kaj apud li Sargon. -Kial mi devas kuŝi sur mia ventro antaŭ tiu ĉi flavbekulo? murmuris li. -Ĉar li estas vicreĝo, respondis Istubar. -Ĉu mi ne estis vicreĝo de mia sinjoro? - Sed li estos reĝo, kaj vi ne. -Pri kio disputas la senditoj de la plej potenca reĝo Assar, demandis la tradukiston Ramzes, kiun jam forlasis lia kolero. - Pri tio, ĉu ili devas prezenti al via ekskelenco la donacojn, destinitajn por la faraono, aŭ nur tiujn, kiuj estas senditaj por vi, respondis lerte la tradukisto. - Kontraŭe mi deziras vidi la donacojn por lia sankteco, diris la princo, kaj mi permesas al la senditoj leviĝi. Sargon leviĝis, ruĝa de kolero aŭ laciĝo, kaj sidiĝis sur la planko, krucinte la krurojn. - Mi ne sciis, ekkriis li, ke mi, la boparenco kaj rajtigito de la granda reĝo Assar, estos devigita per miaj vestoj viŝi la polvon de la planko de la egipta vicreĝo!... Mentezufis, kiu komprenis asirie, ordonis tuj alporti du benkojn kovritajn per tapiŝoj, sur kiuj sidiĝis la malfacile spiranta Sargon kaj la trankvila Istubar."

En tiu ĉi interparolado la romanverkisto reliefigas la potencan atuton de interpretisto. Nenio

devigas lin precize redoni alilingve la tutan enhavon de la parolado, se lia opinio la rezulto estos malfavora por lia kliento. Bonŝance por Sargon, Ramzes ne havis eĉ ideeton pri la nedecaj komentoj, kiujn Sargon elbuŝigis, kiam li kuŝis surventre. Kontraŭe Istubar, kompreninte, kial la egipta princo malkontentiĝis, savis la kapon de Sargon, ordonante, ke li tuj montru humilecon antaŭ Ramzes. Mentezufis saĝe ne informis la princon pri la kialo de la grumblado de Sargon sed, lerte ŝanĝante la temon, sukcesis malstreĉigi la ŝanĝitan etoson en la aŭdiencojo. Fine, Boleslaw Prus prikomentas la rolon de la oficiala egipta interpretisto kaj ankaŭ tiun de la, por tiel diri, kaŝ-interpretisto Istubar. "Nur la du pastroj, La Ĥaldeano Istubar kaj la Egiptano Mentezufis estis trankvilaj, kiel homoj kiuj posedas la scion de la estonteco kaj estas ĝiaj estroj".

Ĉu interpretistoj estas superfluaĵ

aŭ bezonataj? - Esperantistoj ofte argumentas, ke interpretistoj estus superfluaĵ, se ĉiuj en la mondo povus komuniki rekte per la internacia lingvo. Tiel neniu devus transdoni siajn pensojn al tria persono. Sed ĉu ĉiam estas utile havi tiom da libereco por esprimi siajn pensojn rekte, sen peranto, precipe, se oni ne bone komprenas la alikulturajn kutimojn de kunparolanto kaj ne povas antaŭvidi ties reagojn, bazitajn sur fremda psikologia elvolviĝo? Sperthava interpretisto kun lango kaj menso funkciantaj en ambaŭ kulturoj, povas bufri kunpuŝiĝojn de antagonismaj konceptoj. Alimaniere dirite, per lerta "redaktado" de la enhavo de interparolado, li kapablas kaŝi nekonvenajn sintenojn, prisilenti eksplodojn de kolero kaj nuanci esprimojn de antaŭjuĝo kaj malestimo. Kompreneble, estas ankaŭ la alia flanko de la medalo. Nekompetenta aŭ senskrupula interpretisto povas fari grandan malbonon, transdonante nociojn kaj pensojn, kiuj neniam estis esprimitaj fare de la interparolantoj. Malsamlingvuloj, kiuj bezonas helpon de interpretisto, devas akcepti tiun riskon,

krom se estas iu maniero kontroli la fidelecon de la interpretado, eble kun la helpo de paro da interpretistoj aŭ reaŭdigo de magnetofona registraĵo de la interparolado.

Etiko de interpretado— Ni reiru al la sceno en la aŭdiencejo de la egipta princo Ramzes por meti tiun ĉi demandon: Ĉu la egipta interpretisto Mentezufis agis kontraŭ la profesia etiko de interpretistoj, kiam li ne diris egipte ĉion, kion Sargon diris asirie? Ŝi povas imagi, kio estus okazinta al li, se sen lia scio, la princo estus sciinta la asirian lingvon, kaj tiel konstatis, ke lia interpretisto trompis lin. Ĉu do, estas eble akuzi Mentezufis pri fuŝinterpretado, ĉar li ellasis partojn de la konversacio, aŭ pri misinterpretado, ĉar li intence ŝanĝis la enhavon de la eldiroj? Efektive Mentezufis

ne kaŭzis konfuzon aŭ malbonajn rilatojn inter Ramzes kaj Sargon; male, lia intenco estis glatigi la vojon al interkompreno.

Ĉu iam ekzistis kodo de profesia etiko por interpretistoj? Se ne, Mentezufis ne kulpis pri maletika konduto, ĉar li ne interpretis ĉion kun maksimuma fideleco. Efektive la egipta interpretisto agis laŭ tre alta etika normo, kiam li sukcesis trankviligi la furioziĝintan Ramzes. Se oni juĝas Mentezufis surbaze de la rezulto, kiun li atingis, tiam oni povas laŭdi lin pro lia taktplena agmaniero, kiu faris la interpretadon pli bona ol la originala esprimado. Tiu kapablo lerte kaj saĝe trakti delikatan aferon ja estas la esenco de la diplomateco. Ĉu noblaj interpretistoj, kiel Mentezufis ne rajtas enviciĝi samrange kun la eminentaj diplomatoj, kiuj dungis ilin?

Bernard GOLDEN

1+1=3



INTERPAROLADO DE
DU ŜTATESTROJ —
LA INTERPRETISTO
NEPRE ALDONIĜAS

RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1993

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

LA MUMIO DE LA REĜO TABINIT

En grandegan salonon kvar homoj enportis la mumion de la fenicia reĝo Tabinit, metis en vitran ĉerkon kaj kungluis la kovrilon per strioj el nigra tolo. Kvina homo surgluis karteton kun numero, enskribis la objekton en katalogon kaj ĉiuj eliris, fermante la pordon per ŝlosiloj kaj rigliloj.

En la salono ekregis silento. Ĝra la fenestroj sin verŝis malklaraj fluoj de la luna lumo, kolorigante per kreta paleco ĉiujn objektojn, sur kiujn ili falis. Tiam la senmorta animo de Tabinit ree eniris en la mumion kaj la reĝo malfermis la okulojn. Antaŭ ĉio li rimarkis, ke li estas malvolvita el la litotuko kaj tio ekstreme mirigis lin. Poste li rimarkis, ke liaj brakoj kaj lumboj estas sekaj, kiel splitoj de cedra ligno. Tio lin teruris. Fine li rimarkis, ke li ne estas en la bazalta sarkofago, el kiu li ordonis elĵeti Peneftahon kaj destini ĝin por si, sed en travidebla skatolo kun tre moderaj dimensioj. Tio indignigis lin. Tuj li komencis serĉi ĉirkaŭ si la juvelojn kaj kompreneble ne trovis ilin. Tiam venis al li la ideo, ke sendube Aatmes, la filo de Peneftaho ordonis vice elĵeti ilin el la sarkofago kaj aŭ remetis en ĝin la patron aŭ li mem kuŝiĝis en ĝi. Profitante la okazon, li sendube rabis la juvelojn kaj liajn restaĵojn, tiujn de Tabinit, malhonoris, malvolvante ilin el la litotuko. Sed kiel li ekmiris, kiam tra la vitra skatolo en kiu li kuŝis, li rimarkis proksime malgrandan keston, ankaŭ vitran, kaj en ĝi ĉiujn juvelojn kun kiuj li estis enterigita. Li zorge kalkulis. Eĉ ne unu mankis. Kiam li kondukis la okulojn ĉirkaŭe, li ekvidis du bronzaĵajn kandelabrojn, kiuj gardis lian sarkofagon en la sidona nekropolo. La kandelabrojn li rabis en la urbo Berot. Ili estis sendifektaj, sed terure nigriĝis. Li venis al la konkludo, ke oni ne ŝtelis lin, sed ke okazis ŝanĝoj de alia speco.

En ĉiu okazo lia mumio estis

malhonorita, se oni elprenis ĝin el la bazalta sarkofago kaj malvolvis el la litotuko. Li daŭrigis la ĉirkaŭrigardon por ekscii, kiaj pliaj ŝanĝoj fariĝis ĉirkaŭ li. Post la kandelinoj li ekvidis la sarkofagon de sia amata edzino. Tio multe trankviligis lin. Plorema kortuŝo lin ekregis. Sed subite nova ondo de timo trakuris lin de la piedoj ĝis la kapo. Eble ankaŭ ŝia mumio estas elprenita el la sarkofago kaj kuŝas ie apude en travidebla skatolo? Li kondukis la rigardon ĉirkaŭe sed li rimarkis nenion similan. Daŭrigante la esploron li rimarkis fine sian propran sarkofagon: la kovrilo estis duonlevita kaj apogita sur kvar kubaj ŝtonoj. Nun li absolute ne povis kompreni plu la staton de la afero. Li do levis la nigriĝintajn brakojn kaj provis, ĉu oni ne povas apartigi de la skatolo la kovrilon. La algluita tola strio komencis kraki kaj defali. Tabinit ekpemis pli forte. La kovrilo tute deŝiriĝis kaj falis flanken. Tabinit sidiĝis kaj komencis ĉirkaŭrigardi. Stranga vidaĵo sin montris al liaj okuloj.

La salono estis grandega, plena de plej diversaj objektoj, kiuj ordinare vekis lian avidecon. Li ekvidis grandan kolekton de oraj, arĝentaj kaj kupraj moneroj, maloftajn ringojn, ĉenojn ornamitajn per multekostaj ŝtonoj, kol- kaj orel-ringoj, veran trezoron de multekostaj objektoj, ĝojigantaj la okulojn. Li levis sian malfort-igintan manon, por ĝin etendi al la multvaloraj objektoj, sed ili estis tre malproksimaj. Li apogis ambaŭ kubutojn je la parioj de la skatolo, leviĝis, rektiĝis kaj ripozis. Poste, per ŝanceliĝantaj paŝoj li iris al la tabloj. Sed apenaŭ li preterpasis la kovrilon de la skatolo, en kiu li kuŝis, li renkontis tutan vicon de similaj skatoloj, en kiuj estis metitaj mumioj, sed ne malvolvitaj el la litotukoj kaj kun propraj portretoj sur la vizaĝoj. Apude staris sarkofagoj; iliaj kovriloj estis levitaj unu futon kaj subapogitaj, kvazaŭ por esti aerumataj. Tabinit ekrigardis en la duan. Ankaŭ ĝi estis malplena. Li ekspiris libere. Do Peneftaho

ne kuŝas en ĝi. Do eble Aatmes tute ne estis ĉi tie! Tio duone pacigis lin kun la sorto, en ĉiu okazo tute ne komprenebla. Vice li proksimiĝis al la sarkofago de sia amata edzino. Kun teruro li ekvidis, ke ankaŭ ĉi tiu sarkofago estas tute malplena. Li ektimis. Sed tuj li konjektis, ke la edzino sendube kuŝas ie apude en simila travidebla skatolo, en kia kuŝis li kaj en kia kuŝas la aliaj mumioj. Li ĉirkaŭiris la sarkofagon, sed li ne trovis la mumion de sia edzino. Ree li ektimis. Post momento li ekpaŝis antaŭen kaj komencis atente rigardi dekstren kaj maldekstren. Malklara lumo de la luno blankigis la supraĵojn de la objektoj, inter kiuj kaj post kiuj regis densaj ombroj. Li iris sin apogante je la sarkofagoj kaj tabloj, sed vane li ĉirkaŭrigardis. Nenie li povis ekvidi la amatan mumion. Li revenis al la propra sarkofago kaj sidiĝis sur ĝi ĉar li forte laciĝis. Li komencis kolekti la timigitajn pensojn. Tiam senvole li rigardis la surskribon gravuritan en la bazalto, kaj legis: "Ĉi tie ripozas la mumio de Tabinit, sidona reĝo, tre potenca, kiu naskis timon de la najbaroj, kaj por siaj subuloj estis bona kaj indulga. Al la dioj de Fenicio li donacis malavaraĵojn oferojn. Dum sia tuta vivo li estis por neniu maljusta. Vi, kiu legos ĉi tiun surskribon, sciu, ke se vi kuraĝus per bravaĉa mano malfermi kaj rabi ĉi tiun sarkofagon, vi allogos sur vian kapon malfeliĉan la koleron de ĉiuj feniciaj dioj. Kaj vi kruele senreviĝos, ĉar en tiu sarkofago vi trovos nenium trezoron, nenium multekostan ornamaĵon".

Tabinit, leginte la surskribon, levis la okulojn iom pli alten, kie la surfaco de la bazalto estis difektita kaj ne bone glatigita. Oni povis legi sur ĝi la antaŭan surskribon, de simila enhavo, sed anstataŭ la nomo Tabanit estis gravurita la nomo Peneftaho per kursivaj egiptaj signoj. Tabanit ordonis forskrapi la signojn kaj sube gravuri epitafon pri si mem. La skribo estis fenicia kaj ĝia celo estis glori Tabiniton. Ĉiu memoro pri Peneftaho devis esti detruita. Tabinit levis la okulojn ankoraŭ pli alten, kie estis gravuritaj ornamaĵoj: diversaj birdoj, serpentoj

kaj kombiloj. Li pensis ĉiam, ke tio estas ordinaraĵoj, bagateloj, ĉar li estis granda ignoranto kaj malgraŭ la admonoj de la pastroj li ne sidiĝis al la plado de la scienco kaj al la kruĉo de la scio, kiujn oni metis antaŭ li. Sed nun li rimarkis, subite, posedante jam la senmortan vidpovon, ke ankaŭ tio estas skribo, ke ĝi gloras Peneftahon kaj ripetas laŭvorte, kio estis esprimita per la demotika skribo, kaj kion tiel zorge li ordonis forskrapi. Oni iam efektive diris ion al li pri hieroglifoj de la lando Mucur. Nun li vidas ilin. Tio do estas hieroglifoj! La malbenitaj birdoj kantis do la tutan sekreton de la ŝtelo... En la unua momento li eksentis konfuzon ĉar la senton de la honto li tute ne konis. Kiel nesingarda li estis! Kaj la pastroj! Kial ili ne avertis lin? Ili certe sciis, kion kantas la birdoj kaj kion siblas la serpentoj. Nun li komprenis klare, kion li neniam volis kredi dum la vivo, ke la pastroj agis kun li tre hipokrite. Kiom da solenaj procesioj ili kondukis sendube al lia sarkofago, kaj ĉiufoje, kiam ilia rigardo falis sur la birdoj kaj la serpentoj, ili kredeble ridis la malsaĝecon kaj malklarecon de la mortinto... Tabinit eksentis tian abomenon al la sarkofago, en kiu li kuŝis du miljarojn kaj kvin centjarojn, ke li leviĝis kaj sin apogante je diversaj objektoj, ekiris antaŭen. Sed kiel li ekmiris, kiam li vidis apud la muro la hetan reĝon ĉirkaŭitan de bazaltaj leonoj; li sidis senmove sur ŝtona leono kaj rigardis rekte antaŭ si. Tabinit sciis, ke ĉi tiu reĝo jam de longe ne vivas plu kaj ke lian regnon rabis la potenca Salmanassar. Li do proksimiĝis kaj volis demandi kiamaniere li sin transportis ĉi tien kun sia trono kaj kun siaj bazaltaj leonoj. Sed la monarĥo de la Hetoj ne leviĝis por lin saluti, ĉar li tute estis el sama ŝtono, sur kia li sidis tri miljarojn kaj kvin centjatojn.

(daŭrigota)

verkis Niemojevski - Tradukis Dro Kabe

POR VIA DISTRO

Silabenigmo


La trovataj dusilabaj vortoj estis:

ondo - nazo - inko - vino - osto -
jako - algo - ĝibo - akto - sudo -
napo - edzo - piro - ofte - homo -
anjo - lafo - vera - erco - nuda -
inda - sapo - elbo - dozo - pulo -
orfo - rano - vagi - oslo - jeno -
arno - ĝino - irma.

Enigma tomsurskribo

Diofanto mortis en la aĝo de 84 jaroj.

KRUCVORTOJ



Horizontale -

1-Senbuldoza laboro - 2-"Ej! acida!"
diris la fabla vulpo. Inter umbiliko
kaj veziko (r)- 3-Tusiga perforto (r)
4- Malde- Elemento - 5- En briĝo-
En la bufedo - 6- Ankoraŭ ne sperte
kaj tro spontane - 7-Oni respektu ĝin
en biblioteko - 8-Por ĉasi la lupon!
Ĝi povas esti baroka (r)- 9- Usona
ŝtato.

Vertikale -

A-Pantofla laboristo - B- Vivis en
ŝelo. Universala kongreso - Ĉ-
Signas stomakan rifuzon (r).-Li
estas admirata (r) - Ĉ-Enspirata (r)
D-Musteledojn - E-Povas egali la
kvadratan lateron. Poemo - F-
Hamleto aŭ Kirkegaard (r). Tre
granda (r) - G-Subirejo.

LA VIVO EN GRESILLON

ĜENERALA KUNVENO - 28/05/1993

La kunveno komenciĝas je la 15.30 h.

Agadraporto- La Printempa Renkonto kontentige disvolviĝis, kun bonega etoso. Por ebligi la venon de eksterlandaj geknaboj, precipe el orient-eŭropaj landoj, financaĵo daŭre necesas; donacoj jam alvenis.

La someraj staĝoj estis sukcesaj kvankam la ĉeestantoj estis malpli nombraj ol antaŭjare. La prelegoj de la tria studperiodo ne allogis grandan aŭdantaron. Neniu studperiodo estas speciale dediĉita al prelegoj en 1993. Male la kursoj estis atente ĉeestataj.

Sekve de la balotado lastjara du novaj membroj eniris la komitaton: Danièle Gourdon kaj Philippe Combet. Danièle Gourdon estis elektita help-kasistino.

Bedaŭrinde, notinde estas konstati, ke mankas la "someraj skipoj", respondeculoj de staĝoj. Volontuloj estos ege bonvenaj por iniciigi pri la estrado de staĝoj.

La agadraporto estas unuanime akceptata.

Financa raporto- La restado-konto estas iom deficitita en 1992, ĉar venis malpli da partoprenantoj kaj multaj restadis malpli da tempo. Tiu konto estus profita se la impostoj (TVA) estus pli favoraj. Sekve ankaŭ malaltiĝis la aliaj kromaj enspezoj: kotizoj, trinkaĵoj, butikaĵoj; feliĉe ankaŭ elspezoj malaltiĝis: nutraĵoj, salajroj, sociaj asekuraj kotizoj.

La prizorgaj elspezoj koncernis la plibonigadon de la apudkuirejaj laborejoj. Ankaŭ estis necesa la ŝanĝo de kelkaj teretaĝaj ŝutroj. Ankaŭ kostis la daŭra prizorgado de la parko. En 1993 necesos fari gravajn riparojn koncerne la ĉarpentaĵon de parto el la ĉirkaŭa konstruaĵoj. Estis aĉetitaj tabulo, tabloj kaj magnetofono.

La impost-administraro repagis al la Kulturdomo la punmonon kiun ili devigis nin pagi en 1991. Estas nun rekalkulata la TVA 1991 kaj 1992, favore al niaj financoj! Nova leĝo pli favora al la asocio malpezigos tiun ĉapitron.

La libroservo-konto estas iom malpli alta ol la antaŭan jaron. Estas necese diskonigi niajn perkorespondajn kursojn, despli ke la perkomenanta estas tute nova.

La jara konto estas akceptata minus unu voĉo. La bilanco estas akceptata unuanime.

Diversaĵoj- La Fonduso Belbona Espero alportas ĉiujare proksimume 3 000 frankojn, t.e. pli ol 20 restadtagojn en komuna ĉambro por gejunuloj eksterlandaj. Ek de 1993 tiu sumo aperos aparte en la financa bilanco.

Estas decidite, ke la personoj, kiuj malfavore skribas misinformitajn artikolojn en regionaj gazetoj estos invititaj viziti Gresillon dum staĝo por pli bona informado.

La ĝenerala kunveno finiĝas je la 18-a h.

La sekretario de la kunveno: H. Boyet

La komitato de la Esperantista Kulturdomo kunsidis la dimanĉon 30-an de majo. Ĉeestis: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, Ph. Combet, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Métivier kaj J. Vincent. La ceteraj komitatanoj senkulpiĝis.

Staĝoj 1993- La printempa staĝo renkontis grandan sukceson dank'al la veno de 64 infanoj, inter ili 8 Hungaroj, kaj la helpo de mondonintoj kaj staĝogvidantoj. Okazis multaj kursoj kaj diversaj agadoj: plektado, korbofarado, salpastro, filmado, konstruo de marionetoj, studo pri la arbaro, verkado kaj ilustrado de taglibro. Ankaŭ la distraĵoj estis multaj kaj altkvalitaj: malkovro de la regiono, spektakloj, teatraĵetoj kaj, kompreneble, diversaj ludoj. Entute tiu staĝo estis, finance kaj etose tre pozitiva, kaj la ĉefa organizintino, Paulette Naulet, estas gratulinda.

La venontaj staĝoj okazos laŭ la eldonita programo, krom pri la traduka kaj la gramatika kursoj, kies ordo estos interŝanĝita. G. Lagrange kursos ekde la 6-a de aŭgusto ĝis la 11-a kaj F. Boyet la postan semajnon. Eva Bondar gvidos du Cseh-seminariojn (t.e. pedagogia metodo bazita sur rekta instruado en Esperanto) dum la monato julio. La ceteraj instruistoj estos M.J. Berger kaj J. Vincent en junio, Tatjana Loskutova kaj Pšemek Grzibowski en julio kaj aŭgusto. Okazos sesio de la parola parto de la Atesto pri Kapableco fine de la lasta studperiodo.

Administre deĵoros: Pierre kaj Luce Babin, D. kaj J. Moirand, R. Lenel, Ph. Combet, Pascale Babin, D. kaj N. Babin. La komitato denove devis bedaŭri la mankon de deĵoraj bonvoluloj.

Staĝoj 1994- Pri la printempa staĝo, 20 lokoj estos rezervitaj por la eksterlandaj infanoj, por ke ne denove okazu rifuzo al fremdaj grupoj, kiuj sin anoncis tro malfrue. La komitato studis la eventualan organizon de dua semajno de tiu staĝo, por ke la infanoj de Parizo kaj Bordoza (kies libertempo neniam koincidas) povu veni.

Pri la someraj staĝoj, la skizita programo baldaŭ aperos: estas menciinde, ke la kastelo intencas inviti prelegontojn pri la vivo kaj verkaro de Raymond Schwartz (1894-1973), kies naskiĝan datrevenon festos la Esperantomovado.

Diversaĵoj- Danièle Gourdon transprenos la konton de la Kulturdomo per speciala komputilo.

Oni malkovris gravajn difektojn en la ĉarpentaĵo super la granda salono: unu patno estas riparenda kaj multaj abiaj ĉevronoj ŝanĝendaj. Tiuj laboroj kompreneble glutos grandan parton de la prizorga buĝeto. Tial, la plibonigo de la naĝejo estas prokrastita.

La komitato notis la bonan prizorgon de la florbedoj, arbaro kaj lageto fare de entrepreno kaj dank'al spertaj kaj bonvolaj najbaroj.

Grava kaj dankinda mondonaco ebligis la aĉeton de faksilo kaj komputilo por la tenado de pluraj sliparoj.

La kunveno finiĝas je la 13-a horo.

La sekretario de la kunsido: Ph. Combet

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Vian opinion, ke la vorton « ĉu » ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda, mi trovas tute prava. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo, aŭ en aliaj similaj sencoj, kiam ni ne havas pli bonan vorton, sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezzone anstataŭ « jen », « aŭ » k.t.p. Prave vi diras, ke la frazoj « ŝi kutimas havi ĉe sia zono ĉu rozon, ĉu diamanton » kaj « diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto » estas ne tre bonaj ; en la unua kazo mi preferus « jen », en la dua « aŭ ».


(L.L. Zamenhof. Lingvaj Respondoj).



2) Kara patro vi devas elekti : aŭ la naĝejon en la ĝardeno, aŭ la makulojn sur la planko !



1) Ĉu pro frenezeco, ĉu pro troa saĝo, li estas senkontraŭdireble stranga !



3) Mi ĉiufoje renkontas la saman mal-facilaĵon, jen pro difektiĝo de la pneŭmatiko, jen pro via dikiĝo !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalo : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por oklorni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centri-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34